# KOMITATO 10-a de septembro 2025

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj** 5 min

Merkredon la 10-an deseptembro 2025, de la 20a ĝis la 22a, kunvenis pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.

[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | R | | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | R | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | R | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | S | | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | R | | | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | R | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | | X | | |
| Clément | ROUSSET | CR | Repr. de la membraro | | X | | |
| Victor | SIMONNET | VS | Repr. de la membraro | S | | | |
| Bertrand | VERSTRAETE | BV | Repr. de la membraro | R | | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | R | | | |
| Isabelle | NICOLAS | IN | Repr. de fed. Limousin | T | | | |
| Xavier | DEWIDEHEM | XD | Repr. de fed. Hauts-de-France | R | | | |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | R | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | R | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | R | | | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | X | |
| Inès | KAHIN | IK | Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes | | | X | |

17 ĉeestis el 21, 2 senkulpiĝis, 0 donis povon.
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min

XG prezidas, MP kaj VS protokolas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj**

Didier Janot diras ke li ricevis ludemandon. Ĉu estas ekzistanta respondo? 5 min

0.4 **Dato de la venonta kunsido** 4 min

18-a de Oktobro posttagmeze: laborgrupoj
19-a de Oktobro: kunsido surloke en la Ĉerizejo

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 **Agado de la estraro ekde la kongreso** DISKUTO 10 min
Kunvenoj, administraj aferoj, vizito de Xavier en la sidejo kaj diskuto kun Saïd.
Daŭrigo de finpretigo de la financa raporto.

1.2 **Financa raporto 2023/2024.** DISKUTO 10 min
Restas kelkaj operacioj por fini la jarraporton. Tiuj operacioj estis registritaj dum 2024 sed tamen restas en 2025. Seb bezonas fari specialan agon por fini tion. Seb faros tre rapide kaj parolos aparte kun Régis.
Rezulto estas ĉirkaŭ 16 000 eŭroj. Stoko jam revalorigita.
Kiam la raporto estos finpretigita, ni sendos al la membraro sen peti ĝeneralan voĉdonon. Ni respondos al eventualaj demandoj. Kontroli statutojn pri tio.
Regis dankas Seb, Xavier kaj Paul pro la helpo kaj tempo por kunveni kaj solvi la problemojn.
Ni zorgos organizi regulajn kunvenojn pri financaj demandoj dum la venonta jaro.

1.3 **Protokoloj de la lasta komitatkunsido** DISKUTO 10 min
- https://docs.google.com/document/d/1uRlaEKqPyx39G0F0xl3Yc6NH_IHcjQsnMSEBKaLKBog/edit?tab=t.0
- Ne estas demando pri tio.

1.4 **Aliĝilo 2025/2026: lokaj kotizoj + donacoj** DISKUTO 10 min
Sama aliĝilo krom aldono de tri asocioj. Eble unu aŭ du forigoj.
Ŝanĝo por Marsejlo kaj provenca federacio : TS sendos mesaĝon por klarigi ke la tuta sumo restos la sama sed la kvanto por ambaŭ ŝanĝiĝos.
Pri ILEI, kotizoj ne ŝanĝiĝas sed petas ŝanĝon de la prezento. (DJ)
Ordigi klubojn laŭ alfabeta vicigo laŭ urbonomo (aŭ se pli taŭgas por la loka situacio, departemento aŭ regiono) kun interkrampe la nomo de klubo se malsama.
Pri donacoj, ni konservas la pasintajn kategoriojn. Donacoj por baldaŭa reaperigo de LME plu aparte kun klarigo pri paŭzo.
Ĉu sendi al ĉiuj eksaj membroj kun letero, informo pri eventoj ? Negoci por la estraro por amas-sendado.
Pri Lille, Xavier D. proponas ke en la aliĝilo Lille aperu anstataŭ “Lille Métropole”.

1.5 **Ludono de ĉambro**
Estus reklamo por esperanto se homoj interesiĝus pri lingvoj. Ni nepre akceptu kun amika prezo.
Luanto ricevos fakturon kaj devos atesti pri propra asekuro. Ni devos niaflanke deklari al nia asekuro la luanton. Pri la prezo, informiĝi pri prezaro en Francilio pri similaj lulokoj.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 **Restarigo de laborgrupoj kun lokaj aktivuloj (rete plej ofte)** DISKUTO 10 min
Planitaj laborgrupoj por nia sekva kunveno 18-19-aj de Oktobro. Ĉu pri reta komunikado (en Renno, Telegram, Facebook ; ankaŭ Signal kaj aliaj), kiel uzi diversajn sociajn retonj, hibride? Inviti Pierre Vittet, Fransoazo Noireau kaj aliaj lokaj aktivuloj. Okazo de intergeneracia ateliero, peti de JEFO kontribuanton.

2.1 **Ĝisdatigo de niaj komunikiloj : kalendaretoj, faldfolio** DISKUTO 10 min
- Kalendaretoj (40000) estis liveritaj hodiaŭ. Praktikaj por rapide disdoni.
- Faldfolioj estas kelkfoje petitaj de lokaj asocioj. Esperanto Loiret reprenis la nunan flugfolion kaj resendis al SN kun korektoj. La malaltiĝo de la prezoj ebligas presi ĉirkaŭ 5000. BF uzos la informojn kolektitanj dum la lastaj monatoj por proponi novan dokumenton. Relegado estos utila.

2.2 **Lanĉo de trejnad-sesioj : unue pri retaj socioj** DISKUTO 5 min

2.3 **Budo en homara festo**
Pago farita de Régis la 10an de septembro. Nur du tabloj estos disponeblaj kaj ni estos en la “vilaĝo de la libroj”. 8 aŭ 9 volontuloj el Francilia grupo partoprenos.

2.4 **Budo al la salono de la Edukado**
Francilia grupo diskutis la aferon kaj decidis partopreni. La prezo de la budo alproksimiĝas de 1500 eŭroj. Diskuto necesas por havi pli allogan prezon.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

### 3.1 *Le Monde de l'Espéranto* — **DISKUTO** 10 min

Kiu rezulto pri la kontakto kun Céline Bernard ? BF/XG
Xavier kaj Celine diskutis. Céline rigardas ĉu ŝi povas esti "auto-entrepreneur" por ke la administraj klopodoj ne estu tro pezaj por Esperanto Francio.
Inviti ankaŭ RC, Emmanuelle Richard, Gilles Tabard, Christophe Chazarin al unua kunveno venontsemajne.
Strebi publikigi LME dum Decembro aŭ Januaro.

### 3.2 **Kongreso 2026** — **INFORMO** 10 min

RC partoprenis hieraŭ kunvenon en Hérouville-Saint-Clair. La laboro estas bone engaĝita kun jam skizo de programo (tri eblaj prelegantoj, unu kantisto : Armel Amiot). RC vizitis eblan kongresejon : teatro kun 200 lokoj, apude salonoj por komitatkunsidoj, libroservo kaj interkona vespero. Fina decido la 4-a de Oktobro okaze de la membrokunveno de Hérouville-Espéranto.
La klubo bezonas helpon pri kontaktoj ekster Normandio ĉar antaŭe ĉefe Yves Nicolas prizorgis tion.
Pri financoj, EF enkasigas kongreskotizojn kaj loka klubo pagas kostojn. EF povas antaŭpagi la klubon laŭ planita budĝeto.
En Nantes, 19 dejôrantoj el la klubo kun 12 samtempaj deĵorantoj. Necesos helpo el diversaj volontuloj. La urbestro petas 3 personojn por kontroli la enirejojn/elirejojn el la salono.

2027 : Marsejlo aŭ La Ciotat. Respondo je la fino de la jaro 2025 : jes aŭ ne por 202X.
2028 : Lille (eble por festi la 120an datrevenon de la federacio Norda) aŭ en la Pariza regiono.

### 3.3 **Starigo de teamo pri prelegvojaĝoj** — **DISKUTO** 5 min

kun naciaj kaj regionaj respondeculoj (XG preparas dissendoliston por inviti partoprenantojn : el Bretonio, el La Ciotat). Ne necesas havi iun kiel Yves Nicolas por zorgi pri la tuta lando. Regis estis la respondeculo. BR proponis Stéphane Robert kiu post nelonge emeritiĝos. Estis UFE listo pri prelegvojaĝoj. Didier Loison ricevis la dokumentojn de Yves Nicolas antaŭ du jaroj.

- malgranda vojaĝo al la Chaux de Fonds en 2025
- pli granda vojaĝo por 2026

### 3.4 **Rilatoj kun la federacioj kaj la lokaj grupoj** — **DISKUTO** 10 min

- Organizi retan kunvenon kun ĉiuj grupoj (XG)
- Organizi retan kunvenon pri persona spaco sur la retejo por membroj kaj lokaj aktivuloj dum Oktobro aŭ Novembro (XG)
- Ĉu iu respondeculo de Esperanto-France povus partopreni en kelkaj membrokunveoj por montri la investon de la estraro ? AG de Provenca Federacio la 15a de marto 2026, AG de la Norda federacio ĉirkaŭ la Zamenhofa tago.